

Diru tridek tri

[el la Itala Esperanto-Federacio revuo "L'esperanto"]

de Renato Corsetti

9) *Ma Pier Luigi c'è o ci fa?* Pri tradukado de la verbo "fare" al Esperanto.

Ni jam parolis pri la problemoj, kiujn estigas la itala vorto "*che*", kiam oni volas traduki ĝin al Esperanto. Oni devas pensadi pri la signifo en la unuopa esprimo kaj traduki laŭe.

La samo okazas ĉe alia itala vorto: "*fare*". La baza signifo estas "*fari*", "*plenumi*", "*igi*" (iun faru ion). Multajn ekzemplojn pri tio vi trovas en la vortaro Esperanto-itala de Carlo Minnaja.

Ĉi tie nun ni nur amuziĝu per kelkaj apartaj uzoj de "*fare*". Estas somero, kaj pro tio ni ne provu kunmeti ilin en kategoriojn, ktp.

- Ofte ĝi simple estas tradukinda per "estas" aŭ simple per "-as", ekzemple: *fa caldo, fa freddo, fa buio, fa schifo* = estas varme/varmas, estas malvarme/ malvarmas, estas mallume, estas abomeninda/naŭza/vomiga. Atentu: mi mem renkontis plurajn italajn komencantojn, kiuj diras "Faras varmo/varme/varma". Instruistoj, bonvolu insisti.
- Ne ĉiam ĝi estas tradukebla per "estas". Foje ĝi signifas "*diventare*", ĉefe en la formo "*farsi*". Ekzemple: *si fa notte, si è fatto grande, si è fatto male, fatti avanti, cretino!* = Noktiĝas, li kreskis/grandiĝis, li vundiĝis antaŭeniĝu, kreteno!
- Ne ĉiam "*farsi*" estas tradukebla per "igi". Foje ĝi estas tute aktiva. Ekzemple: *si è fatto una famiglia, si è fatto la macchina nuova*, = Li kreis al si familion, li aĉetis novan aŭtomobilon, li vundiĝis. Apartan uzon oni trovas en la popola lingvo: *Lui quella ragazza se l'è fatta* = Li amoris kun tiu knabino.
- Foje la signifo estas "*costare*". *Quanto fa? Fanno due euro* = Kiom tio kostas? Ĝi kostas du eŭrojn.
- Foje la signifo estas "*segnare, indicare*" «*Che ora fa il tuo orologio?*» «*Fa le tre e un quarto*» = Kioman horon montras via horloĝo. Ĝi montras la trian kaj kvaronon.

- Foje "*ritenere*", "*considerare*". *Non lo facevo così intelligente* = Mi ne taksis lin tiel inteligenta.
- Foje "*frequentare una scuola, ecc.*" . *Che classe fai? Fa la prima elementare.* = en kiu lerneja jaro vi estas. Li estas en la unua jaro de la bazgrada lernejo.
- "*Assumere un atteggiamento, un tipo di condotta*". *Fa lo scemo, il furbo; fa il signore* = Li kondutas kiel stultulo, ruzulo, li kondutas kiel riĉulo/superulo.
- "*Realizzare una prestazione*". *Quest'auto fa quindici chilometri con un litro di benzina, fa i cento metri in dodici secondi* = Ĉi tiu aŭtomobilo bezonas 1 litron da benzino por iri 15 kilometrojn, li kuras cent metrojn en dek du sekundoj.
- "*Svolgere l'attività o l'azione specificata dal complemento*". *Fare a testa o croce, Fare a palle di neve* = Ludi je fronto aŭ dorso (dankon, Carlo Minnaja!), ludi je neĝopilkoj.
- "*Per introdurre un discorso diretto, dire*". *E lui allora fa: «Come mai sei qui?»* = Kaj li tiam diris: "Kial vi estas ĉi tie?"
- "*Creare*", "*Generare*", "*Partorire*". *Dio fece il mondo in sei giorni; fare fiori, frutti; La gatta ha fatto i gattini* = Dio kreis la mondon en ses tagoj; Ekhavi florojn, fruktojn; Nia katino naskis.
- "*Essere adatto, conveniente*". *Questa è la casa che fa per te* = Jen la domo taŭga por vi.
- "*Avere la funzione, fungere*". *Fare da padre; Questo divano può anche fare da letto* = Patri, agi kiel patro, anstataŭi la patron; Ĉi tiu sofo povas funkcii ankaŭ kiel lito.
- "*Avere una certa forma flessa*". *Come fa al plurale "ciliegia"?* = Kiel estas en la pluralo "ciliegia"?
- "*Avere un certo testo o una determinata melodia*". *Non ricordo come fa quella canzone* = Mi ne memoras la vortojn/la melodion de tiu kanto.
- "*Chiamarsi*". *Fare di nome, di cognome, come fa di nome Rossi?* = Havi la personan nomon, la familian nomon. Kiu estas la persona nomo de Rossi?
- "*Richiamare, ricordare uno stile, un modo di essere*". *Un abito che fa molto francese, delle scarpe che fanno chic* = Vesto tre franceca, ŝuoj tre elegantaj.

- "*Essere trascorso*". *Fanno due mesi che lavoro qui* = Estas du monatoj de kiam mi laboras ĉi tie.
- "*Dare come risultato di un'operazione aritmetica*". *Uno più due fa tre, quanto fa sei per sei?* = Unu kaj unu estas du, kiom estas ses oble ses.
- "*Trascorrere, passare*". *Fare Natale in famiglia, fare le vacanze al mare, fare tre ore di coda* = Pasigi/festi Kristnaskon hejme, pasigi siajn feriojn/ferii ĉe la maro, vicostari dum tri horoj.

Kaj kio pri Pier Luigi? Simple tiu frazo estas tradukebla laŭ la signifo per "Ĉu Pier Luigi vere estas (stulta) aŭ nur ŝajnigas esti (tia)"

Tre simple, ĉu ne? Sufiĉas pensi pri la signifo kaj havi antaŭ la okuloj japanan komencanton.